FONDITA en 1908. TRIA SERIO
29a JARO — N° 201. Okt. 1961

REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO
FRANCA ESPERANTISTO

U.E.F., 34, rue de Chabrol, Paris Xe — Métro : Gare de l'Est ou Poissonnière — Téléphone : PRO. 55.03



Une partie des participants à la visite des collections japonaises

(Photo du groupe d'Angers)

ORIENT - OCCIDENT

Conformément au programme de l'UNESCO, le Groupe Espérantiste d'Angers a organisé une série de manifestations consacrées aux Peuples Orientaux, parmi lesquelles une visite, commentée en langue internationale, des remarquables collections japonaises du Musée local Pincé

FRANCA ESPERANTISTO
REVUE FRANÇAISE D'ESPÉRANTO

OFICIALA ORGANO DE U.E.F. (Unio Esperantista Franca)

34, Rue de Chabrol, Paris Xe - C.C.P. 855-35 Paris

Secrétariat :

Mlle Y. PAULIER. - Le Secrétariat est ouvert tous les jours de 9 h. à 12 h. et de 14 à 18 h. (sauf dimanches et mardis). Pour toute réponse, joindre une enveloppe timbrée à votre adresse. - **Pour tout envoi d'argent, précisez soigneusement la destination des sommes envoyées sur le talon du mandat.**

Pour toute demande de renseignements, prière de joindre **une enveloppe timbrée avec l'adresse.**

Rédaction :

M. Paul CILIGA, U.E.F., 34, rue de Chabrol, PARIS Xe. Tél. : PRO. 55-03.

Tous les articles et communiqués ne peuvent être acceptés qu'aux conditions suivantes : **être toujours dactylographiés** sur un seul côté de la feuille, avec une marge des deux côtés du texte et un **double interligne.** Ainsi seulement ils seront insérés. Tous les articles **ne se conformant pas à ces conditions seront refusés par la rédaction.**

Les textes envoyés doivent être aérés, lisibles, correctement présentés et rédigés.

Prière d'envoyer des clichés et non de simples photos.

La rédaction se réserve le droit de corriger les textes reçus, qui doivent être aussi brefs et concis que possible.

U. E. F. COTISATIONS

Les versements sont à effectuer au trésorier fédéral ou, à défaut, à l'U.E.F. (Paris). C.C.P. 855-35 Paris.

	NF :
MEMBRE APPROBATEUR	1,50
MEMBRE ACTIF	3,50
MEMBRE ACTIF (avec abonnement)	10
MEMBRE JUNIOR : moins de 21 ans* (TEJO) et **étudiants****	6
MEMBRE BIENFAITEUR U.E.F. (avec abonnement à la « RF d'E. »)	20
MEMBRE A VIE U.E.F. (avec abonnement)	300
Abonnement seul à la REVUE FRANÇAISE D'ESPÉRANTO	7
Pour l'étranger — Por eksterlandaj abonantoj	10

SUPPLEMENT POUR **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO** (U.E.A.)

	NF :
MEMBRO JARLIBRO (reçoit l'Annuaire de l'U.E.A.)	10
MEMBRO ABONANTO (reçoit « Esperanto » et Annuaire)	20
(La kotizoj de junuloj ĝis 21 jaroj * estas respektive **5 NF** kaj **10 NF** ; nun JMJ kaj JMA estas aŭtomate TEJO-anoj ; la pliaĝaj studentoj pagas plenan kotizon).	
MEMBRO SUBTENANTO	30
SIMPLA ABONO AL « ESPERANTO »	15,50

Les versements concernant le Groupe des Educateurs Espérantistes sont à faire à G.E.E., 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.) - C.C.P. Nantes 1501-41. Membre simple : 800 Fr. ; de soutien : 1.000 Fr. ; bienfaiteur : 1.200 Fr. (8, 10 et 12 NF).

* Indiquer la date de naissance.

** Indiquer la Faculté.

Membro de la Usona Domo de la Reprezentatoj parolis en Esperanto



Kongresano Silvio O. Conte, Respublikana Membro de la Usona Domo de Reprezentantoj, partoprenis en Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko. S-ro Conte, kiu venas el la sama Ŝtato, sed ne el la sama partio kiel Prezidento Kennedy, klarigis la rolon de la Respublikana opozicio sub la Kennedy-registaro. Parton de siaj klarigoj li donis mem en Esperanto, alian parton legis parolisto. Nia bildo montras Kongresanon Conte en lia oficejo sur la Kapitola Monto malantaŭ mikrofono de la Voĉo de Ameriko. Apud li staras D-ro William Solzbacher, estro de la Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko kaj membro de la Akademio de Esperanto. S-ro Conte, advokato, antaŭe estis membro de la Ŝtata Senato de Masaĉuseco. Aliaj membroj de la Usona Kongreso, kiuj parolis en Esperanto en la programoj de la Voĉo de Ameriko, estas Senatano Ralph Yarborough, el la Teksas-ŝtato, Reprezentantino Marguerite Stitt Church, el la Ilinoj-ŝtato, kaj Reprezentanto Roman Pucinski el la Urbo Chikago. S-ro Pucinski aperis trifoje en Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko. Sinjoroj Yarborough kaj Pucinski estas Demokratoj, S-ino Church kaj S-ro Conte estas Respublikanoj.

A NOS LECTEURS

Par suite d'incidents techniques indépendants de notre volonté — suivant les termes consacrés — la « Revue Française d'Espéranto » (Franca Esperantisto) ne vous est pas parvenue avec toute la célérité désirée (1).

Dès le Congrès d'Epernay, le Conseil d'Administration de l'Union Espérantiste Française (U.E.F.) s'est penché sur le problème de l'information rapide et régulière.

Grâce au bienveillant appui de notre ami Micard, le sympathique Directeur de la Maison Culturelle Espérantiste du Château de Grésillon, nous avons pu trouver un nouvel imprimeur — qui n'est d'ailleurs pas inconnu de notre mouvement puisqu'il imprime déjà l'excellente revue « Kulturaj Kajeroj » — et qui a bien voulu se charger, aux moindres délais, de l'impression de notre organe officiel.

Nous espérons pouvoir diffuser les nouvelles urgentes, les comptes-rendus des groupes ou des fédérations, les annonces de manifestation, etc. par un tirage rapide, réalisé si possible à Paris.

Ainsi notre Revue nous donnera, grâce au voisinage de Grésillon, l'aspect culturel indispensable sans que l'information et la liaison perdent de leur efficacité.

Les fédérations et les groupes doivent maintenant envoyer le plus vite possible leurs communiqués, dactylographiés en espéranto, ainsi que leurs clichés intéressants et leurs remarques éventuelles à notre rédacteur, M. Paul Ciliga, licencié ès lettres (adresse de la rédaction : 34, rue de Chabrol, Paris X[e] ; adresse privée, réservée à la correspondance personnelle et aux envois très urgents : 56, rue d'Assas, Paris VI[e]), qui reprend ses fonctions, provisoirement interrompues pour cause de force majeure, afin de poursuivre et d'intensifier son action systématique pour la diffusion et la défense de la Langue Internationale et des vrais principes de l'espérantisme authentique — tel qu'il a été défini par la Déclaration de Boulogne-sur-Mer — et dont une neutralité réelle et constructive demeure l'élément essentiel.

René LLECH-WALTER,
Président de l'U.E.F.

---

(1) N.D.L.R. — Notre ancien imprimeur s'exprime ainsi dans sa dernière lettre : « Il est exact que nous n'avons pu tenir des délais de parution réguliers. Nous nous en excusons bien vivement, mais vous remercions de la confiance que vous avez bien voulu nous témoigner jusqu'alors ». Voilà qui est clair.

Pour que la Revue puisse paraître normalement il est indispensable que chacun assume pleinement ses responsabilités et se conforme entièrement aux instructions rédactionnelles (plus spécialement celles qui se trouvent en deuxième page de couverture et en tête des principales rubriques).

Nous faisons appel à la coopération active de tous les espérantistes dignes de ce nom et conscients des grosses difficultés auxquelles nous devons faire face actuellement. De simples critiques ne peuvent résoudre ce problème et nous permettre de réaliser notre programme d'information spécialisée. Pour pénétrer dans les milieux cultivés, et plus particulièrement scolaires et universitaires, indispensables au succès de l'espéranto, nous ne pouvons nous contenter d'une circulaire. Il nous faut une publication présentable et d'un niveau culturel acceptable, sans être excessif.

C'est pourquoi toutes les bonnes volontés doivent se manifester. (Nous avons en particulier le plus pressant besoin d'une personne capable de centraliser et de rédiger la « Vie des groupes et des fédérations ». Avis aux amateurs sérieux).

Afin d'assurer la régularité de parution il sera nécessaire d'établir un calendrier aussi précis que possible et d'instituer un système de dates limites pour l'envoi des textes dactylographiés et des clichés, car si la rédaction reçoit les matériaux toujours en retard, comme cela a été — hélas — trop souvent le cas jusqu'à présent, il est bien évident qu'elle ne pourra pas faire paraître ponctuellement les prochains numéros de notre Revue.

L'Homme et la Langue

J'ai eu l'occasion d'écrire : « Il faudrait l'établir scientifiquement et physiologiquement, mais l'Espéranto semble certes plus NATUREL POUR L'ESPRIT que de nombreuses langues, dont les caprices ressemblent tout à fait à des créations arbitraires et fantaisistes. C'est de telles EXPLORATIONS SCIENTIFIQUES et d'autres encore qu'aurait dû en premier lieu entreprendre l'I.A.L.A., au lieu de se contenter, bien à tort, de la seule étude des formes, travail d'érudits et de compteurs de mots, et non pas de savants. A n'en pas douter, ce sera l'un des principaux reproches que l'histoire inscrira au compte de cette institution. » Cela venait en fin d'un article (*) où j'essayais d'inaugurer un nouveau champ d'étude : les rapports qui peuvent exister entre l'homme et la langue qu'il emploie. Il est de toute évidence que l'I.A.L.A. avec les puissants moyens dont elle disposait aurait pu, si elle l'avait voulue, mener à bien une telle étude, une telle entreprise. Elle se serait intéressée aux rapports univrsels entre l'homme et la langue, au lieu de se cantonner à l'étude d'un système apparenté à quelques langues d'Occident, langues encore considérées en cette deuxième moitié du siècle comme langues principales.

Or, l'I.A.L.A. a pour le moins effleuré le problème ! C'est ce que j'ai appris en lisant, après la composition de mon article, la somme du Prof. Waringhien « Lingvo kaj Vivo » - La Laguna 1959 - 450 p. Ce recueil d'essais d'espérantologie, traite quelques sujets seulement, mais si importants pour quelques uns qu'il est absolument impossible d'ignorer cet ouvrage si l'on veut traiter d'Espéranto au point de vue linguistique. A la page 371 Waringhien nous cite un passage d'un autre ouvrage qui serait plus connu, s'il n'était écrit en néerlandais : Dr. W.J.A. Manders : « Vijf Kunsttalen », c.à.d. : Cinq langues construites. Voici cette citation :

« Sous les auspices de l'I.A.L.A. on organisa l'expérience suivante : 20 étudiants d'université, n'ayant aucune connaissance spéciale de l'Espéranto ni de l'Ido, étudièrent les 45 mots corrélatifs de l'Espéranto et les mots correspondants, irréguliers, de l'Ido, pendant 90 minutes pour chaque cas. La chose était ainsi arrangée que 10 d'entre eux étudièrent l'Espéranto le 4 janvier et l'Ido le 5, tandis que les 10 autres étudiaient inversement l'Ido le 4 et l'Espéranto le 5. Ensuite le 6 janvier, eut lieu pour les 20 étudiants un seul test, dont voici les résultats : pour la traduction des mots de la L.I. en anglais, la moyenne des réponses justes fut :

44 pour l'Espéranto et **43** pour l'Ido ;

Pour la traduction inverse de l'anglais en langue internationale, la moyenne des réponses justes fut :

32 pour l'Espéranto et **15,5** pour l'Ido. Et le rapport de conclure :

« Le système espéranto de corrélatifs a été critiqué pour son artificialité, son excès de système et sa difficulté; notre propre examen ainsi que notre expérience personnelle des choses nous avait poussé à faire la même critique, mais une expérimentation plus large nous a instruit à douter de la validité de telles critiques. »

(Language Learning, a Report to I.A.L.A., Columbia University ; New-York 1933) ».

(Pour que nos lecteurs puissent suivre rappelons que les corrélatifs en question de l'Espéranto peuvent être présentés dans un tableau à 2 entrées et qu'ils sont formés d'une première syllabe et d'une terminaison. Les mots correspondants de l'Ido, tout comme ceux de l'Occidental et de l'Interlingua n'ont que très peu de rapport entre eux : ils sont irréguliers et tirés des langues occidentales ou du latin. Il n'y a que des différences de détail entre les formes que prennent ces mots dans ces 3 systèmes ; c'est dire que l'expérience ci-dessus aurait donné des résultats analogues avec l'Occidental (InterlinguE) ou avec l'InterlinguA).

Ainsi donc l'I.A.L.A., d'après ce que nous savons, a au moins une fois effleuré un vaste sujet ! Or cette institution aurait dû faire des centaines, sinon des milliers d'expériences de cette nature : les faire porter sur les points les plus variés de l'Espéranto (de l'Ido, etc...) en faisant varier les conditions d'expérimentation : avec des anglophones, des français, des japonais ; avec des étudiants, des enfants, des adultes ; avec des érudits, des illettrés... etc..., avec des méthodes pédagogiques différentes, etc... Il aurait été autrement intéressant d'apprendre scientifiquement quelles sont les raisons profondes qui font que tous ceux qui ont appris à manier l'Espéranto éprouvent une sensation d'aise dans cet emploi, sensation qu'ils n'éprouvent jamais au même degré avec une autre langue, même avec leur langue maternelle ! Par intuition les pratiquants de l'Espéranto sentent la supériorité de leur langue. Et quand on vient leur dire avec aplomb (et même quand ce « on » est un grand « pontife » de la linguistique), que leur langue ne vaut rien, que voulez-vous qu'ils fassent d'autre que de hausser les épaules ?

Quant à l'I.A.L.A. elle a purement et simplement enterré l'affaire !

Les études interlinguistiques (et peut-être aussi linguistiques ?) se sont tournées jusqu'ici à peu près exclusivement vers les études de forme, vers les rapports des langues entre elles, comme si les langues existaient par elles-mêmes ! Il faudrait à mon avis se soucier des rapports entre l'homme et la langue.

Dr. André ALBAULT (Bulletin « Néos »).

(*) Paru dans « Esperantologio » II, 1 (Nov. 59), p. 41-57. Sous le titre : « Essai sur la dynamique de la composition des mots en Espéranto ». L'auteur peut en envoyer un imprimé à part contre 1,50 NF. en timbres-poste de 0,25 NF : Dr. Albault, 8, avenue Et.-Billières, Toulouse.

COMMUNIQUÉ DE L'U.E.F.

Dons :

S-ro Pouille : 0,70 NF. ; Anonimulo : 5 NF.

Membres Bienfaiteurs :

S-ino Lorge, S-ro Lorge, S-ro Surmont, S-ro Jeagy.

Nécrologie :

Oni komunikas al ni la forpason de S-ro Derlemont.

ERATUMO : en Nº 200, p. 76, kolumno 2, ni erare anoncis la morton de la patrino de S-ro Olivaux. Temas fakte pri lia edzino, kruele disiĝinta de li post 42 jaroj da kunvivado.

Carnet rose :

M. et Mme Darnault nous ont fait part du mariage de leur fille Claude avec M. Jacques Daniel, ingénieur statisticien économiste.

Nos meilleurs vœux aux nouveaux mariés.

M. Robert Olivaux, d'autre part, nous annonce le mariage de sa fille Thérèse avec le Docteur Guy Charpentier.

Nous nous associons à sa joie comme nous participons à son deuil.

KOMUNIKO DE LA REDAKCIO

Pro la transformiĝo de nia Revuo nur parto de la kompostita materialo povas aperi nun. Ni devis prokrasti i.a. tre longan aron da recenzoj.

LA PREZIDANTO VOKAS VIN

La tradicia sezono de la rekomenco de ĉiuj kulturaj aktivaĵoj denove alvenis. Ankaŭ por ni, esperantistoj, tiu sezono devas estis la komenca punkto de revigligita aktivado. Ĉiu, laŭ siaj ebloj, devas kontribui al nia komuna tasko. Tiuj, kiuj kapablas, gvidu kursojn. Sed multajn aliajn taskojn povas plenumi tiuj, kiuj ne havas pedagogiajn ecojn. La bona funkciado de la kluboj kaj asocioj postulas multe da tempo kaj energio. Ankaŭ vi povas kaj morale devas labori sur tiu tereno. Oni devas forgesi tiun individuismon, kiu karakterizas niajn latinidajn popolojn kaj kunigi ĉiujn fortojn. Kunlaboru kun la ceteraj esperantistoj en via urbo, fondu klubon se ĝi ne ekzistis antaŭe, revivigu ĝin se ĝia aktivado stagnis kaj, se ne estas esperantistoj en via urbo mem, klopodu rilati kun la plej proksimaj, ĉar klubo povas ankaŭ ampleksi plurajn proksimajn urbojn, kaj tiam interkonsentu pri komuna programo.

Se vi sukcesas instrui Esperanton en iu ajn lernejo, nepre necesas, ke vi interrilatu kun la Lerneja Komisiono : **S-ro A. RIBOT, 11, rue Paul-Vergnes, MARMANDE (Lot-et-Garonne).** Legu atente la regularon pri lernejaj kursoj aperintan en « Franca Esperantisto », n° 195-6, Dec.-Jan. 1961, kies enhavo estas zorge pripensita por eviti bedaŭrindajn mispaŝojn.

Alia tre grava punkto estas la propagando. Profitu ĉiujn eblojn por okazigi informajn prelegojn kaj taŭgajn ekspoziciojn pri Esperanto. Tiurilate konvenas insisti, ke la ekspozicioj devas montri modernajn kaj belaspektajn revuojn, librojn, afiŝojn kaj broŝurojn. Gardu en la fundo de via ŝranko la makulitajn kaj ĉifonitajn materialojn ! Ili tre malbone efikas en ekspozicio. Escepte, oni povas montri gravajn malnovajn librojn aŭ revuojn, kondiĉe ke apud ili estu klarigoj atentigantaj pri la valoro de tiaj malnovaj specimenoj. Sed ĝenerale ili aperu en minimuma kvanto, por eviti ke ili efiku kvazaŭ objektoj de antropologia muzeo ! Memoru ke U.E.F. povas provizi al vi taŭgajn afiŝojn kaj propagandilojn en franca lingvo kaj ankaŭ la afiŝojn eldonitajn de UNESKO kun Esperanta teksto. Vi mem povas peti al la turismaj agentejoj, per simpla poŝtkarto, iliajn eldonaĵojn en Esperanto.

Pri la prelegoj, zorgu ke ili estu vere altnivelaj. Ofte estos interese paroligi eksterurbajn prelegistojn, ĉar oni devas fidi tiun diron, kiu asertas : « Neniu estas profeto en sia propra lando ». Mi mem, S-ro Ribot kaj ĉiuj estraranoj de U.E.F. estas je via dispono por prelegi en via urbo. (Vi devus tiuokaze repagi nur niajn vojaĝelspezojn).

Estas tre konvene, ke vi instigu ĉiujn samurbajn esperantistojn subteni niajn asociojn U.E.F. - U.E.A., ĉar ili efike reprezentas nian movadon antaŭ la naciaj instancoj kaj internaciaj organizaĵoj.

La nuna laborsezono komenciĝas laŭ plej favoraj aŭspicioj. La kuraĝiga fakto, ke ekde la 1a de Septembro ĉijara Esperanto estas devige instruata en 50 lernejoj de Pollando, kaj ke baldaŭ etendiĝos ĝia deviga instruado al ĉiuj polaj porinstruistaj seminarioj kaj elementaj lernejoj, devas efiki kiel potenca stimulilo por nia entuziasmo kaj sindonemo.

Ek al la laboro kaj fina venko !

René LLECH-WALTER.

KULTURA SEMAJNO — PASKO 1962

KASTELO GRESILLON (Francujo)

De la 16a ĝis la 20a Aprilo 1962 okazos en la Kastelo « Grésillon », Baugé (Maine-et-Loire), Francujo, Kultura Semajno antaŭ la Nacia Kongreso de l'Unio Esperantista Franca, kiu okazos en Baugé de la 21a ĝis la 23a de Aprilo 1962.

S-ro René Llech-Walter, Komitatano de U.E.A., Prezidanto de U.E.F., respondecas pri tiu Paska Kultura Semajno. Pluraj eminentaj esperantistoj francaj kaj alilandaj favore respondis por eventuala partopreno kiel prelegontoj.

Monatan komunikon publikigos la organiza komitato.

KOMPRENIS

Oni rakontis anekdoton pri du profesoroj, eminentaj kuracistoj, kiuj tre ĵaluze rivaladis en la profesio. Foje tiuj du hazarde renkontiĝis ĉe fervoja stacio. La unua diris, en afabla tono, al la alia : « Kara kolego, mi vidas el via trajnbileto, ke ni vojaĝas en la sama trajno, tamen mi devas bedaŭri, ke ni ne povas kune sidadi, ĉar mi mem havas bileton en la unua klaso, kaj mi, ree el via bileto, vidas, ke vi vojaĝas duaklase. Tion mi ne povas fari, ĉar mi havas tiel multe da pacientoj, ke certe kelkaj min konsultus en la trajno, nature kvazaŭ konversacie, kaj sen pago. Jen kial mi ne povas sidi en la dua klaso. Certe vi komprenas ? » Al kio la dua eminenta kuracisto respondis mieltone : « Certe, kara kolego, mi tion bone komprenas, mi havas precize la saman kialon vojaĝi en la dua klaso anstataŭ la unua ».

Quelques opinions sur l'Espéranto

Rapport du Comité d'Information sur l'Espéranto au Congrès d'Epernay

S-ro Prezidanto, Gesinjoroj,

Mi devas sciigi vin pri la agado de la **Franca Komitato pri Esperantista Informado.** Tiu ĉi, fondita de generalo Bastien kaj Sinjoro Warnier, kies ambaŭan memoron ni emocie salutas, ĝis nun laboris tute sendepende por diskonigi la internacian lingvon. Sed ĝiaj anoj opiniis, ke preferinde estus agadi en kunlabora kunligiteco kun U.E.F., kaj ili pensis ke ilia komitato povas fariĝi speciala fako de U.E.F.

La komitato opiniis, ke tiel agante ĝi montras ekzempleron incitantan al regrupiĝo de ĉiuj diversaj asocioj ĉirkaŭ nia « Nacia Unuiĝo » kaj memorigas al ĉiuj la maksimon faman : « Unuiĝo plifortigas ».

Tiucele la komitato modifis siajn statutojn kaj konsentis je tio, ke ĝia regula prezidanto estu la U.E.F.-a prezidanto.

Nunjare, la Franca Komitato pri Esperantista Informado komencis vastan informan propagandon apud anoj de oficialaj organizaĵoj :

Du cent naŭ dek kompletaj dokumentaroj konsistantaj el ses dokumentoj estas individue senditaj al la anoj de « Conseil Economique et Social ».

Cent tridek samaj dokumentaroj al la anoj de « Comité de la République Française auprès de l'U.N.E.S.C.O. ».

Mi tuj legos eltiraĵojn el kelkaj de mi ricevitaj respondoj :

De M. AURIC (Président des Sociétés d'Auteurs compositeurs et Editeurs de musique) :

« La cause que vous défendez me semble excellente et je ne peux qu'en souhaiter la meilleure réussite. C'est pourquoi je vous demande d'associer mon nom à tous ceux qui, déjà, sont d'accord avec vous».

De M. BARTEL (Secrétaire Général du Comité Régional de l'U.N.E.S.C.O. à Strasbourg) :

« La cause que vous défendez me paraît digne d'intérêt. Les efforts que vous entreprenez devraient déjà pouvoir s'appliquer aux jeunes ».

De M. LEBETTRE (Directeur de l'Enseignement du 1er degré au Ministère de l'Education Nationale) :

« Je suis convaincu de la nécessité d'une langue internationale. C'est sans arrière pensée que je souhaite prospérité à votre œuvre ».

De M. BAYEN (Recteur d'Académie, Directeur du Palais de la Découverte) :

« L'effort que vous faites est un effort pour la paix et la compréhension humaine, il recueille toute ma sympathie, je vous donne bien volontiers mon accord ».

De M. WYART (membre de l'Institut, professeur à la Sorbonne) :

« Je suis persuadé que les progrès extraordinaires des moyens de communications rendent plus nécessaire et plus urgente la diffusion d'une langue internationale. Si vous pensez que mon nom peut être utile à votre action, je serai heureux que vous vous en serviez ».

De M. Jean ROSTAND (de l'Académie Française - Biologiste et Homme de Lettres) :

« C'est avec une grande satisfaction que je m'associe à tous ceux qui souhaitent de voir se généraliser l'étude d'une seule langue internationale, capable de faciliter les échanges culturels entre les nations. Je ne doute pas qu'en travaillant pour la diffusion de l'Espéranto, on ne travaille aussi pour une meilleure transmission du savoir et pour la compréhension mutuelle des peuples.

L'Unité de l'espèce humaine appelle la communauté du langage. Pour ma part, j'espère que le moment n'est pas loin où tous les hommes pourront communiquer entre eux par l'Espéranto. »

Kiel vi povas vidi, tiuj respondoj estas stimulantaj. Ili montras kaj pruvas al ni ke Esperanto ekkonatiĝas kaj ekestas subtenata de tute elstaraj personoj.

Nun, post kiam ni klopodadis dum tri monatoj, ni sukcesis donigi al ni, de Ministrejo pri Nacia Edukado, la liston de **Cent kvindek** nomoj kaj adresoj de la anoj de « Conseil Supérieur de l'Education Nationale et des Recteurs ».

Kompleta dokumentaro nun estas disportata al ĉiuj tiuj gravaj personoj.

Aliflanke la Komitato planas sendi baldaŭ dokumentaron al la gravaj francaj firmaoj kiuj eksportas varojn fremlanden.

Okaze de tio, ĝi antaŭdankas ĉiujn personojn kiuj povus al ĝi sendi la nomojn kaj adresojn de francaj aŭ fremlandaj societoj, kiuj jam normale uzas Esperanton.

La adreso de la komitato estas :

34, rue de Chabrol, PARIS Xe

G. ROUGETET.

5-a INTERNACIA SEMINARIO DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO EN KOLONJO APUD REJNO

Kiel en la pasintaj jaroj ni aranĝos inter Kristnasko kaj Novjaro nian tradician Seminarion, al kiu ni kore invitas niajn eksterlandajn geamikojn.

Jen la unuaj informoj :

Honora Protektanto : S-ro Theo Burauen, ĉefurbestro de Kolonjo.

Loko : La tute nova kaj tre moderna junulargastejo en Köln-Deutz, situanta vid-al-vide de la gotika katedralo kaj la centra stacidomo de Köln.

Tempo : De la 27a de Decembro 1961 vespere ĝis la 2a de Januaro 1962 tagmeze.

Programo : Pri la ĉefa temo « **Usono kaj Sovjet-Unio — Ĉu eblas kunekzistado de la du kontraŭaj socisistemoj ?** » prelegos Prof. D-ro Ivo Lapenna, London, kaj Prof. Lucien Laurat, Paris. Krome okazos vizitoj al Köln kaj Bonn, film- kaj lumbildprezentadoj, silvestra balo kaj aliaj amuzaj programeroj.

Prezo : Pro ŝtata subvencio la prezo (enhavanta loĝadon, ĉiujn manĝojn kaj seminariajn arangojn) estos nur 48. — GM por gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj kaj 60. — GM por pliaĝuloj. Parto de la vojaĝkostoj (ĝenerale 50 %) sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo estos repagata al la gepartoprenintoj malpli ol 25-jaraj.

Aliĝo : Ĝis la 1a de Novembro 1961 al s-ro Ulrich Lins, Gemarkenstrasse 146, Köln-Dellbrück, Germanujo, kun indikoj pri nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Por plifaciligi nian organizan laboron, bonvolu aliĝi kiel eble plej baldaŭ.

Koran bonvenon en Kolonjo apud Rejno !
Germana Esperanto-Junularo.
Federacia Estraro.

Problemo al niaj gvidantoj

LA MOVADO STRANGOLATA EN RETO!

De kelkaj jaroj la Esperanto-eldonejoj, se eble pli vigle ol antaŭe, eldonas kaj eldonadas ĉiam pli valorajn verkojn. Ĉiuj seriozaj esperantistoj aĉetas, legas kaj aprezas ilin. Tiu aĉetado instigas al nova eldonado. Tiel, iom post iom, la nivelo de la esperantistaro leviĝas kaj tio estas salutinda.

Kiam vi deziras libron, vi mendas ĝin jen de via nacia libroservo, jen de iu internacia libroservo, kiel tiu de « Heroldo » aŭ tiu de U.E.A., ktp... Vi baldaŭ ricevas ĝin kaj vi scias, ke vi pagas la plej ĝustan, t. e. la plej malaltan prezon : niaj libroservoj ne vere funkcias sur komerca bazo, ili estas kreitaj por servi societanojn, samideanojn. Ĝenerale tia servosistemo kontentige funkcias. Krome, ni ja devas tion diri, la eta profito, ja multe pli eta ol la komerca profito en librejoj, ofte estas necesa al la vivo de la koncernaj asocioj. Almenaŭ tiu profito estas bonvena enspezo apud la kotizoj. Ĝi estas necesa por fronti la elspezojn de propagando kaj informado, de nova eldonado kaj ĝenerala servado al la membroj. Konklude la reto de libroservoj, unu el la spinoj de la movado, estas nemalhavebla institucio de nia movado. Ĝi bone servas la anojn ; ĝi tre forte helpas la asociojn. Ĉio estas tre bona. Kion deziri pli kaj plu ? Kaj tamen !

Efektive, se ni iom ĉesas rigardi nin mem kaj niajn societojn, por ĵeti rigardon en la vastan mondon, ni povas rimarki alian pentraĵon : ni vidas iun movadon fermitan sur si mem, kaj ni baldaŭ konscias, ke unu el la katenoj, kiuj enfermas ĝin, estas ĝuste tiu reto de libroservoj ! Jes ! La movado estas strangolata en reto ! En reto de libroservoj ! Kiam iu aŭdis pri Esperanto, aŭ, eĉ pli, jam deziras ĝin lerni, lia unua movo estas sin turni al la kutima librejo, kiu jam kapablis liveri al li ĉiuspecajn verkojn... por informiĝi, ke ne ekzistas konataj Esperanto-libroj ! Li, vole-nevole, akiras la ideon, ke Esperanto ne ekzistas, aŭ ankaŭ pli malbone, ke ĝi estas nur apartenaĵo de iu fermita sekto !

Laŭdire, en Brazilo, la movado tre disvastiĝis, ĝuste danke tiun fakton, ke la libroj estis haveblaj tra la tuta lando en librejoj. Ĉu la ebleco aĉeti verkojn pri io ajn ne plej evidente pruvas ke tiu « io ajn » ekzistas ? Fakte oni eĉ ne atentas pri tia evidentaĵo ; male, ĝia manko altiras la atenton kaj, ekzemple, oni emas komenti, ke do la esperantistoj nur blufas : envere ili ne ekzistas !

Kion do fari ?

Plej simpla solvo — aplikebla meminiciate de loka Societo — konsistas en tio, ke ĝi venigas stokon de 20-30 lernolibroj kaj deponas ilin en konatan librejon, centre de l'urbo. Sed ne parolante pri multaj ĝenaĵoj, kiuj estas ricevataj en la rilatoj inter la eldonejoj kaj la vendistoj — memoru la martelon kaj la amboson ! — ni tuj estas trafitaj de unua baro : la procentaĵo, kiun nepre deziras ricevi la libristo. Ni tuj reparolos pri tiu temo. Sed ĝi faras, ke iniciatebla de loka Societo, tiu solvo ne estas ĝeneraligebla. Necesas tutlanda racia solvo.

Fakte ni devas fronti du problemojn : la distribuado de la libroj ; la procentaĵo al la komercisto. Sin greftas la tria : nemalaperigo de la libroservoj !

Nu ! Ni okupiĝu nur pri Francio : estos jam sufiĉe komplike ! Ni scias, ke en Parizo funkcias iu organismo aŭ firmao « La Maison du Livre », ĉe kiu la libristoj de la tuta lando kutimas provizi sin. Tiu firmao kolektas la mendojn de la tuta lando kaj venigas de la diversaj eldonejoj — tre ofte en Parizo ! — sufiĉe grandan kvanton da libroj samtempe. Poste ĝi pretigas pakaĵojn laŭ la mendoj de la diversaj libristoj. Per tiu sistemo la mendo-formalaĵoj unuflanke, kaj ĉefe aliflanke la sendokostoj estas reduktitaj al minimumo.

Sajne sufiĉus, ke ni havu kontakton, kun tiu « Maison du Livre » tra kiu ni facile povus sendigi katalogojn (kun informoj pri ĉiuj Esperanto-libroj eldonitaj en Francio) al almenaŭ ĉiuj gravaj libristoj. Necesus ankaŭ havi sufiĉan stokon ĉe iu pariza adreso de ĉiu franca eldonaĵo, ĉefe de ĉiu lerno — aŭ studo-libro. Kompreneble necesus ankaŭ entreprenema prizorganto ! Mi volas veti, ke post kelkaj jaroj, tia aranĝo povus vivteni sian homon. Ne ĉio estos facila : komerca entrepreno, ĝi devos pagi impostojn, atenti leĝojn, ktp... ĝi devus esti kooperativa entrepreno de ĉiuj francaj Esperanto-eldonejoj, malferma al eventuale novaj eldonistoj. Ĝi funkcius por la bono de la movado : ĉefe en la komenco, ĝi povus ricevi monapogon flanke de la francaj Esperanto-Societoj.

Post kelka tempo, ĝi devus peradi ankaŭ la alilandajn eldonaĵojn ! Tiujn oni povus mendi en iu ajn librejo tute same, kiel por libroj en aliaj lingvoj. La tutmonda Esperanto-literaturo iĝus konkreta kaj palpebla por la vastaj amasoj...

Mi diris, ke la dua problemo estas tiu de la procentaĵo al la komercistoj, ktp... Alidire la problemo de la vendoprezo. La libristoj kutime konservas 30 % el la vendoprezo. Dume, niaj libroservoj konservas nur 10 %, maksimume 20 % el tiu prezo. Per aliaj vortoj, se libro estos aĉetita en librejo, ĝi nepre devos kosti pli ol ĉe iu ajn el niaj libroservoj. Verŝajne, tio estis ĝis nun la plej granda bazo. Sed ĝi estas nur psikologia baro !

Efektive solvo ekzistas, kiu malutilas al neniu. Male ! Praktike la libroservoj vendas nur al la anoj de koncerna asocio. Tio estu proklamita regulo ! Tio estu speciala avantaĝo al la anoj de ĉiu landa asocio — kiel okazas ankaŭ an aliaj asocioj, ankaŭ profesiaj —. La ne-anoj turnu sin al la librejoj... aŭ aliĝu al la Societoj ! La ĝenerala publiko ne konas la societojn kaj tute normale ĝi vizitas la komercejojn, kiam ĝi deziras kontentigi sian scivolemon, deziron aŭ bezonon ! Per tia sistemo ne plu trafos ilin seniluziigo. La nombro de l'esperantistoj kreskos ! Ili eble pagos la librojn pli multe sed ili trovos tute normala, ke aparteno al Societoj donas al ili avantaĝojn : ekzemple, libroprezoj pli moderaj. Ceteraj iuj preferos sian liberecon malgraŭ la pli altaj prezoj. Ili eĉ provos samvoje ricevi kaj alilandajn eldonaĵojn kaj abonojn al gazetoj...

Sekve, tiel ekzistos du paralelaj merkatoj de la Esperanta libro : libroserva kaj libreja : ambaŭ havos siajn klientojn. Sed kio gravos, estos ke nia movado per tio mem, jam estos rompinta en unu punkto la gangon de nekonateco, kiu ĝin strangolas kaj sufokas ! Post tio ĝi povos plu kreski kaj pli normale.

Ĝi povos iĝi amasmovado, anstataŭ aspekti klubeca aŭ eĉ sekteca. Sed necesas, ke iu kapablu funde studi la problemon, trovi la solvojn kaj... ilin efektivigi, ĉar mi nur skizis ilin : leviĝos aliaj problemoj kiel ekzemple la neceso de speciala reklamado. Mi antaŭvidus reklamojn en revuoj, magazinoj kaj aliaj « diĝestoj » per koncizaj sloganoj, meze de blanka spaco, kiel ekzemple : « Un livre d'espéranto s'achète dans toute bonne librairie »...

D-ro Andreo ALBAULT.

Sous le double signe du Mondialisme — et de l'Espéranto —

Un nouveau terrain de camping municipal à VALLON-PONT-D'ARC (Ardèche)

Le nouveau terrain de camping municipal de Vallon-Pont-d'Arc est magnifiquement situé sur les rives ensoleillées et pittoresques de l'Ardèche, au cœur d'une région éminemment touristique. Son port de canots constitue un point de départ idéal pour la descente des gorges célèbres et sauvages dont le parcours est jonché de tant de merveilles, avec, comme porche d'entrée ce magnifique arc de triomphe de rochers qu'est le Pont d'Arc.

C'est sous ce fier monument, créé par la nature il y a des siècles, que l'Ardèche s'engouffre avant de rejoindre le Rhône, après sa course folle dans les canons grandioses, fourmillants de cavernes et de grottes aux mille curiosités inoubliables.

C'est le 23 Juillet dernier qu'a été inauguré le nouveau terrain de camping, en présence de nombreuses personnalités officielles ainsi que de MM. Robert Sarrazac, grand maître de l'idée mondialiste, et Roger Bernard, membre de l'Institut Français d'Espéranto. Le soir, une magnifique soirée folklorique avec le Groupe d'Aubenas (Ecole de danse de Mme Durand) et la Société « Les Enfants d'Arauzio » d'Orange, a clôturé cette journée exceptionnelle.

Exceptionnelle, disons-nous, car la municipalité de Vallon-Pont-d'Arc a voulu dédier son terrain de camping à la mémoire d'un grand bienfaiteur de l'humanité : le Docteur Lazare Zamenhof, initiateur de la Langue Internationale. Monsieur Henri Ageron, Maire, fervent adepte de l'espéranto, a bien compris que la renommée de Vallon-Pont-d'Arc, première cité « mondialisée » de l'Ardèche et recevant chaque année des centaines de touristes étrangers allait de plus en plus se répandre dans le monde entier surtout lorsque la route des gorges de l'Ardèche sera terminée.

Or, les campeurs et touristes étrangers qui se côtoient à Vallon pendant l'été ne peuvent, la plupart du temps, ni se comprendre ni se faire comprendre, parce que parlant des langues différentes. C'est pourquoi il est bon de leur rappeler qu'un homme de cœur et un génie, le Dr Zamenhof a mis au point, sur la base des éléments lexicaux communs aux langues européennes et d'une structure agglutinante proche des langues asiatiques, un idiome facile à apprendre par tous, qui est l'espéranto.

Le Groupe Espérantiste du Vivarais « Vivara Stelo » a organisé à l'occasion de l'inauguration du nouveau terrain de camping Zamenhof, une rencontre internationale (du 23 au 29 juillet). Au cours de la semaine, de nombreuses visites et excursions ont eu lieu, notamment la descente des gorges de l'Ardèche en barque, la visite des célèbres Avens d'Orgnac et Marzal, du Musée Alphonse Daudet à La Vignasse, de la Distillerie de Vallon, de la Brasserie de Ruoms, des villes d'Aubenas et Vals-les-Bains. Une excursion en car sur le plateau cévenol par le Gerbier-de-Joncs, le Lac d'Issarlès, le Barrage de Lapalisse a clôturé cette belle manifestation.

IMPRESOJ PRI LA 46-a U.K. DE ESPERANTO

Certe, vi jam atendas la unuajn impresojn de nova kongresano, sed fakte la kongreso en Harrogate estis por mi la 13-a. Tamen ĝia programo entenis la unuan internacian artan festivalon, kiu estis por mi tute nova sperto, kaj kiun mi ege ĝuis. Mi ne scias, kion mi plej ŝatis : ĉu la jugoslavajn dancojn, tiel admirindajn, ĉu la teatrajojn, tiel arte prezentitajn, ĉu la ĥorkantojn tiel ravajn... Ĉiu kongresa vespero estis altnivela arta ĝuo, kiu forgesigis la malbelan veteron, ventan kaj pluvan.

Tuta paĝo ne sufiĉus por mencii la ceterajn interesplenajn programerojn de la Internacia Somera Universitato, la fakajn kunvenojn, k.t.p. La ekskursoj ankaŭ lasis al ĉiu partopreninto neforgeseblan memorajon pri la Norda Maro, la lagoj aŭ la montoj de Jorkŝiro.

Ĝis la 47-a en Kopenhago !

Jeannine VINCENT (Les Andelys).

SARTRE et COCTEAU en langue internationale devant un public de 40 pays

Harrogate, août. Pour la première fois dans l'histoire du théâtre, des œuvres importantes de J.-P. Sartre et J. Cocteau (La P... respectueuse * et La Voix Humaine) ont été jouées en espéranto, dans l'excellente traduction de M. Roger Bernard, au cours du Premier Festival International de l'Art à Harrogate.

Les deux pièces furent présentées par le Théatre Artistique International (une troupe professionnelle se composant d'acteurs et actrices de plusieurs nationalités, sous la direction de Srdjan Flego, Paris).



J. COCTEAU

Dans « La voix humaine » de Cocteau le rôle unique fut très bien joué par Jana Ravšelj, de Paris, et dans « La P... respectueuse » de Sartre, Eta Bartolazzi, de Zagreb, brilla dans le premier rôle, tandis que le sénateur fut joué par l'acteur yougoslave Mladen Šerment.

Outre les pièces mentionnées plus haut, la même troupe a présenté la farce de « Maître Pathelin », dans laquelle le metteur en scène a brillamment joué le premier rôle.

Dans le cadre du Festival un événement extraordinaire fut aussi la présentation (par une troupe de Londres) d'un drame japonais en un acte : « Okuni et Gohei », de Zyun'itiro Tanizaki, de l'époque Takugawa (17e siècle). L'atmosphère exotique fut très bien rendue par les acteurs anglais, comme les Japonais présents ont pu le constater. Cela a été atteint par une étude approfondie du sujet et du milieu.

Une troupe de Bristol a présenté, également avec succès, la comédie célèbre (en un acte) de Tchékhov « L'Ours ».

Sous le titre « La Méditerranée chante », un chœur de jeunes de Ljubljana (Slovénie) a présenté des chants populaires d'Espagne, de France, d'Italie, de Yougoslavie, d'Israël et du Liban. Tous les chants furent chantés en Langue Internationale, ce qui a donné au public international présent la possibilité de comprendre leur sens et leur esprit.

De Yougoslavie également était venu l'ensemble « Branko Cvetkoviĉ » qui a présenté avec un grand succès des danses folkloriques yougoslaves ainsi que quelques chants yougoslaves traduits en espéranto.

En outre, le Festival a donné des présentations de bandes sonores et de films ; de concerts de musique classique et moderne ; des concours d'éloquence et de littérature ; une exposition de livres et de peintures, tout ceci en Langue Internationale espéranto.

*) N.D.L.R. — Nous nous permettons de rappeler que «respectueux» doit se traduire par « respektoplena » ou « respektema ». Le mot « respektinda » signifiant bien entendu « respectable », son emploi est incorrect dans le cas de la « P... ».



J.-P. SARTRE

Pri nia nacia centro

Depost jaroj ni decidis principe refari la pentraĵojn de nia centro 34, strato Chabrol, sed ĉiam ni estis timigitaj pro la altaj kostoj.

Lastatempe, dinamika junulo kiu ne nur fabrikas monon, sed ankaŭ havas oran valoron por estonta edzino, decidis dum speciala libertempo ataki la gravan laboron.

Artista komitato studis la aferon kaj decidis pri harmoniaj koloroj. — Samideano vendis al ni je favora prezo la pentraĵojn kaj paperojn. Oni dungis tri ĉarmajn virinojn, kiuj akceptis forlasi siajn elegantajn vestaĵojn por protektantaj jupoj kaj konsentis uzi por la vizaĝo gipsan pudron anstataŭ rizan. Estis kuriozaj piknikoj. Ili estis nule pagataj kaj akceptis fari pli ol 8 horojn tage, sen plialtigo. Ili estis tiel simpatiaj, ke du maljunaj gravaj eminentaj — viole dekoritaj — samideanestroj pli aŭ malpli akompanis ilin, ĉefe en la ĥoroj.

Kompreneble, eĉ en gaja atmosfero estas ĉiam akcidentoj, kiam oni peze laboras — kaj unu el la brunulinoj, kiu imitis birdon sur branĉo, falis de la ŝtuparo. Ŝi faris tion tiel lerte, ke ne estis eĉ unu frakasita osto. Simple ŝi devis resti dum tri semajnoj en lito.

Dum unu monato la ĉambroj estis en terura ĥaoso, la klientoj devis eniri laŭlonge de la muroj, marŝante sur malpuraj paperoj. Nia sekretariino estis perdita. Plie, ŝi perdis dum la arta laboro siajn okulvitrojn kaj pro tio, ne povante bone legi, ŝi eble sendis flagon al persono, kiu petis insignon... Ĉu estos plendoj?

Fine, ĉio estis reordigita, la planko purigita kaj novaj modernaj lampoj fiksitaj ĉe la plafono kaj la nigra tabulo.

Inaŭguro venis, ĉampano fluis kaj nun mirakle ĉio plibeliĝis kaj pliboniĝis. La laboro faciliĝis je 200 %. La vizitantoj petas laboron por helpi al nia sekretariino. La lernantoj tuj komprenas la regulojn — ita — ata — dum la kursoj.

Sed la plej grava afero estis prezenti la ŝanĝon al nia prezidanto, kiu ne sciis la aferon. Kompreneble ni esperis agrablan surprizon. — Tute ne ! Unue li ne rekonis la lokojn kaj poste preskaŭ havis koratakon, kiam li pensis pri la elspezoj. Unue muta pro emocio, li poste diris, ke ni certe ruinigis la asocion kaj ke ni devas mem zorgi pri la repago de la ŝanĝoj. Ĉar fakte estis malmulte da elspezoj, ni simple decidis, ke la Parizanoj ŝparos la monon de la kutimaj trinkaĵoj en la kafejoj dum unu monato kaj « la truo en la kaso estos ŝtopita », diris nia financa ministro.

Nia fama aŭtoro de la Stranga Butiko kaj la tikla tradukanto de Topaze voĉdonos kontraŭ tiu demokrata decido. Sed ne gravas — ni sendis la unuan al lia alzaca farmdomo kaj la alian al liaj inferaj okupoj.

Nun ni ne plus hontas pri nia centro kaj ministroj povos viziti nin.

SABROLANO.

Kongreso de Harrogate

LA TEATRA PARTO

La teatra programo de tiu **Arta Festivalo** estis aparte alloga : la Internacia Arta Teatro, la Londona kaj la Bristola amatoraj Trupoj rivalis per promesplenaj titoloj, kaj mi devas tuj diri, ke la rezulto estis, krom unu escepto, granda sukceso.

Tiu escepto, des pli bedaŭrinda, ĉar ĝi konsistigis la tradician « **Teatran Vesperon** » de la Kongreso, estis la prezentado de la farso « **Advokato Patleno** ». La celo de farso estas ridigi la spektatorojn, kaj tiu ĉi vere ne atingis sian celon. Tio estas ŝuldita al pluraj eraroj de la reĝisoroj kaj tradukinto, s-ro Flego : eraro pri la elekto de tiu mezepoka teatraĵo, kies komika forto preskaŭ tute forpolviĝis laŭ la jarcentoj (neniu moderna franca reĝisoro iam entreprenis renovigi ĝin, kvankam ĝi estas tradicie tre konata en la lernejoj) ; eraro en la tradukado, farita per rimitaj versoj, kio devigis la tradukinton al multaj ne kutimaj vortordoj, verŝajne tre agrablaj ĉe la legado, sed tre spiritkonfuzaj ĉe la aŭdado ; eraro en la enscenigo, ĉar, pro la absolute senmotiva enkonduko de du modernaj pajacoj, la ĉefaj scenoj estis ludataj en la fundo de la scenejo, kaj la paroloj estis ofte apenaŭ distingeblaj. Oni vere bedaŭras, ke la grandaj kaj indaj penegoj de la tuta trupo estis vanigitaj de tiuj fundamentaj eraroj.

Feliĉe, la du aliaj pecoj, prezentitaj de la sama I.A.T., estis tre bonaj, efike enscenigitaj kaj artisme luditaj. Ili estis tradukoj el la franca moderna teatro, el la plumo de Roger Bernard : « **La homa voĉo** », de J. Cocteau, tre malfacile ludebla monologo, estis preskaŭ perfekte kaj tre emocie ludata de Jana Ravŝelj, sub la reĝisorado de s-ro Flego ; « **La Respektema P...** » (1) de J.-P. Sartre, enscenigita de la Kolektivo I.A.T., estis prezentado, kiu sincere povis konkurenci tiujn, kiujn profesiaj aktoroj donas en Parizo : Eta Bortolazzi, Mladen Serment kaj Srdjan Flego ludis kun sobra kaj impresfara arto.

La Londona Trupo, konsistanta el s-ino Rapley, kaj s-roj Wells kaj Sadler, prezentis juvelon el la japana literaturo « **Okuni kaj Gohei** » : la enscenigo, la ŝminkado, la gestado, la elparolado, ĉio estis de la plej delikata gusto, kaj ĉiuj nuancoj de la teksto estis fidele kaj trafe interpretitaj. Oni scias, kiel malfacile estas prezenti orientan, ĉefe ekstrem-orientan teatraĵon, evitante la ridindaĵojn aŭ la krudaĵojn : niaj Londonaj amikoj brile triumfis.

« **La Urso** » de A. Ĉeĥov, prezentita de la Bristola Esperanto-Societo, estis tre agrabla komedieto, kiu bone distris la publikon : la sola manko estis, ke la ĉefaj aktoroj havis anglan akcenton iom tro por rusoj (Irene Lock havis eĉ tre **Victorian** sintenon, krome) ; sed eble tio nur akcentis la komikecon de la afero : la publiko entute estis tre kontenta.

Mi esperas, ke en Kopenhago la Internacia Arta Teatro, pli klare konsciante nun sian vojon kaj siajn kapablojn, ĝuigos al ni aliajn same rimarkindajn prezentojn kaj ankaŭ same elvokos la rivalecon de lokaj trupoj.

G. WARINGHIEN.

(1) « Komika preseraro transformis la titolon al « La respektinda p... » ! La Gazetara Servo kaj la redakcio de « ESPERANTO » bedaŭrinde ne korektis tion.

" VIVO DE LA GRUPOJ KAJ FEDERACIOJ "

La Redakcio akceptas nur tajpitajn tekstojn en korekta Esperanto. Ni povas aperigi nur preskliŝojn, NE simplajn fotojn.

FÉDÉRATION D'ALGÉRIE-SAHARA

La fédération compte 24 membres à jour de leurs cotisations : U.E.F. : 23 dont 2 bienfaiteurs, 14 abonnés, 7 non abonnés.

U.E.A. : 10 dont 1 DV, 1 MS, 5 MA, 3 MJ, et un abonné à « Esperanto ».

Un certain nombre d'anciens membres n'ont pas encore réglé leurs cotisations. Ont-ils quitté l'Algérie ? Est-ce de la négligence ?

Activité en 1960-61. — La situation en Algérie ne permet pas de travailler dans de bonnes conditions : les habitants de cette province, accablés de soucis particulièrement graves, n'ont ni la possibilité, ni même le désir de s'intéresser à l'espéranto.

Le bureau a continué à informer le public par la voie de la presse. Le poste R.T.F., France V, a diffusé un communiqué. Mais les résultats sont nuls.

Chaque membre multiplie les occasions d'agir en faveur de la langue internationale. Mais là aussi, les efforts ne sont pas couronnés de succès.

Avenir. — Tant que la situation n'évoluera pas, le mouvement stagnera, régressera peut-être.

Il faut essayer de tenir et espérer. C'est ce que nous faisons.

Koran saluton.

F. JELENC.

HENIN-LIETARD

A l'occasion du Congrès Départemental des Œuvres Laïques (Lillers, 27 et 28 Mai 1961) S-ro Lucien Bourgois, secrétaire de la Fédération Espérantiste du Nord, a présenté le vœu suivant :

« L'Amicale Laïque d'Hénin-Liétard souhaite voir le développement de l'espéranto comme langue internationale, dans les Amicales Laïques par la création de sections espérantistes au sein des Amicales Laïques.

L'Amicale Laïque pense que l'espéranto peut être et doit être appris dans toutes les classes primaires et secondaires ».

Ce vœu a été transmis avec avis favorable à la Ligue de l'Enseignement. Notons que l'Amicale Laïque d'Hénin-Liétard compte 937 membres et la Fédération des Œuvres Laïques du Pas-de-Calais. 130.000 adhérents.

Cordiales félicitations à notre ami Lucien Bourgois pour son utile initiative ; espérons qu'en d'autres régions de France, le même vœu sera présenté dans les congrès de F.O.L. et transmis ensuite à la Ligue de l'Enseignement.

MONTELIMAR

La esperantista grupo de Montélimar en la Suda parto de Francujo, ĉijare organizis tri Esperanto-kursojn, gvidatajn de S-ano Llorens, profesoro en la liceo de tiu urbo. La publika kurso havis nur 3 gelernantojn, sed la kurson en la gimnazio de Le Theil ĝis fine frekventis 9 lernantoj. Tiu kurso komencis en Novembro 60 por la 3-a sinsekva jaro.

La 16-an de Januaro, la rektoro de la Akademio de Grenoble akceptis la malfermon de Esperanto-kurso en la liceo de Montélimar. Pro malsano de la gvidanto, tiu kurso komenciĝis la 1-an de Marto kaj 15 gelernantoj regule vizitis ĝin.

La 17-an de Majo, 23 el la gelernantoj de la tri kursoj trapasis la Esperanto-ekzamenon « Atesto pri Lernado » 11 sukcesis. La ekzameno estis sufiĉe malfacila, ĉar pere de ĝi, 5 gelernantoj de la liceo de Montélimar kaj 5 de la gimnazio de Le Teil estis elektitaj por senpage partopreni karavanon al Torino. Estas notinde, ke la gelernantoj de la liceo de Montélimar povis ricevi nur sep unuhorajn lecionojn kaj tamen 11 trapasis la ekzamenon kaj ses sukcesis.

27 geesperantistoj partoprenis tiun vojaĝon al Italujo. Forveturante per aŭtobuso, de Montélimar, la 1-an de Julio, ili alvenis posttagmeze en la junulargastejon de Torino, kie atendis ilin la U.E.A. Turismo, delegitino F-ino Giroldi. Vespere ili renkontis la multnombrajn torinajn gesamideanojn, je la 22-a 1/2 ili estis akceptataj en la granda itala jurnal-eldonejo « La Stampa », kie ili estis tre interesitaj de la diversaj laboroj pri la presado de la jurnalo.

Dimanĉe matene, gvidataj de F-ino Giroldi, ili vizitis la urbon kaj kunvenis ĉe la tombo de Prezidanto Canuto, kie la prezidanto de la Esperantista grupo de Montélimar deponis florbukedon.

Posttagmeze, la granda ekspozicio de Italujo 61 multege interesis la Montélimar-anojn kaj ĉiuj ege ĝuis tiun agrablan vojaĝon, tre zorge organizitan de la sindonema samideanino F-ino Giroldi el Torino.

La jurnalisto de « Le Progrès » de Liono kaptis fotografajon de la partoprenantoj antaŭ ilia foriro, je la 5-a matene kaj post ilia reveno, ili intervujis la karavanestron kaj aperigis longan artikolon kun foto en la gazeto.

TOURCOING

La loka rondo detale vizitis fakan lernejon konatan en la tuta regiono de Lille-Roubaix-Tourcoing.

Temas pri « l'école de complément et de rééducation physique », kie la direktoro, S-ro A. Delahaye, afable bonvenigis la geesperantistojn.

Post klarigoj kaj multaj demandoj, la interesa kunveno finiĝis per amika babilado kun gasto el Pollando.

Tri membroj ricevis la Ateston pri Supera Lernado : S-ino M. Lelièvre, Sroj A. Ringotte kaj L. Giloteaux.

ESPERANTO en la FRANCAJ LERNEJOJ

I. — INSTRUIST(IN)AJ SEMINARIOJ LERNOJARO 1959-60

Bouches-du-Rhône :
En la 2 seminarioj de Aix-en-Provence, kurso regule gvidata de S-ro Jullien, profesoro en Aix, al la gelernantoj (50) de la unuaj klasoj, dum 1 horo ĉiusemajne.
En Marseille (E.N. annexe) Esperanton instruis S-ro Garrigue.
Calvados :
En la 2 seminarioj de Caen, instruas S-ro Martin.
Cher :
En la instruistina seminario de Bourges, sub la kontrolo de la tiea estrino F-ino Bertrand kaj de S-ro Blanc (Sancoins), F-ino Gateau (4a klaso) instruas al 22 lernantinoj de la unua klaso.
Côtes-du-Nord :
En la 2 seminarioj de St-Bieuc, instruas S-ro Marais.
Gironde :
En la instruistina seminario de Caudéran, F-ino Saux instruas Esperanton al 22 lernantinoj. Ĉiuj sukcese trapasis « Ateston pri lernado » en la fino de la lernjaro.
Hérault :
En la instruistina seminario, S-ro Lentaigne gvidas kurson al 10 knabinoj. Dum 3 sinsekvaj jaroj, dank'al subvencioj, kelkaj kursaninoj gastadis ĉe esperantistaj familioj en Nederlando.
Pas-de-Calais :
En la instruista seminario, la tiea profesoro pri angla lingvo S-ro Odent instruas Esperanton al 34 lernantoj (el 3 diversaj klasoj). La kursanoj kreis Esp. rondon, kiu celas interrilatojn kun Esperantistaj kolegoj el eksterlando.
Pyrénées-Orientales :
En la 2 seminarioj, kursoj de S-ro Llech-Walter al la gelernantoj de la unuaj klasoj : 20 lernantoj (inter ili S-ro Intendanto), 19 lernantinoj. En la fino de la lernjaro, ili trapasas « Ateston pri lernado ».
Kvankam ne ĉiuj kursestroj donis informojn dum la sekvanta lernjaro, tamen oni povas esperi, ke en la supre cititaj seminarioj, similaj Esp. kursoj okazis en 1960-61.

PLIAJ KURSOJ EN 1960-61

Ardèche :
En la 2 seminarioj de Privas, S-ino Bascou instruas Esperanton al entute 40 gelernantoj.
Charente-Maritime :
En la instruistina seminario de La Rochelle, instruas F-ino Pinçon.
Gironde :
En la instruista seminario de Bordeaux-Mérignac, F-ino Cosson instruas Esperanton al 12 lernantoj.
Landes :
Laŭ la 5a numero 1961 de Nuntempa Bulgario, S-ino Combebias gvidas Esp. kurson al 13 lernantoj de la instruista seminario en Dax.
Meuse :
En Bar-le-Duc, tre admirinda kaj imitinda laboro : S-ro Denis instruas Esperanton al 70 lernantinoj (inter ili S-ino Direktorino). Pro la granda nombro de kursaninoj, 2 paralelaj kursoj okazas ĉiusemajne.
Konkludo :
La supra statistiko indikas do 19 seminariojn kun enture pli ol 350 gekursanoj, kiuj baldaŭ estos profesiaj instruist(in)oj. Tiaj rezultoj jam estas gravaj kaj kuraĝigaj. Multaj seminariestroj simpatias al nia lingvo kaj favoras malfermon de Esp. kurso en siaj lernejoj. Tion ili faras eĉ pli volonte, kiam ni sciigas en kiuj seminarioj jam okazas Esp. kursoj. Laŭ fidindaj informoj ni povas esperi je kreo de novaj kursoj en pliaj seminarioj dum la venonta lernjaro 1961-62. Antaŭen por Esp. kursoj en 25 francaj seminarioj !

II. — EN ALIAJ LERNEJOJ LERNOJARO 1960-61

Elementaj Lernejoj :

Bordeaux : knabina lernejo, rue Gratiolet. F-ino Cosson instruas al 5 knabinoj.
Cluses : knabina lernejo. S-ino Michon instruas al 25 knabinoj.
Dijon : knabina lernejo, bd Voltaire.
Les Andelys (Eure) : S-ino Vincent instruas al 14 knabinoj (en 2 kursoj).
St-Trojan-les-Bains (Ch.-Maritime) : la tiea lernejestro instruas al 10 knaboj.
Caluire (Rhône) : F-ino Clavier instruas Esperanton jam de 15 jaroj. Iamaj gelernantoj fariĝis aktivaj esperantistoj. Nun 2 kursoj ; elementa (13 geknaboj), daŭriga (3 geknaboj).
Ni aldonu, ke en 1959-60, S-ro Kolonelo Omont, post interkonsento kun la Ministerio pri Nacia Edukado, instruis Esperanton al 600 infanoj de elementaj lernejoj en Versailles. Kelkaj el liaj lernantoj partoprenis kun profito la Internacian Infankongreseton en Bruselo.

Mezlernejoj (C.E.G., Collèges Techniques) kaj Gimnazioj (Lycées) :

Angers : En Collège Technique Filles, kurso de S-ino Cheverry.
En Collège Technique Chevallier, kurso de S-ro Marchand.
Arras : En la knabina Mezlernejo (C.E.G.), kurso de S-ro Monnier.
Aubenas : En la knaba teĥnika Mezlernejo, 2 kursoj. Instruas S-roj Blanc kaj Noury.
Baugé (M.-et-Loire) : En la mezlernejo, S-ro Bidoit instruas al 22 knaboj.
Bergerac : En la mezlernejo J.-Ferry, S-ro Curnier instruas al 10 knaboj.
Cosne-sur-Loire (Nièvre) : Mezlernejo kaj gimnazio : 2 kursoj sub la gvidado de S-ino Chaumereuil : 40 gelernantoj.
Dieppe : En la knaba teĥnika Gimnazio, instruas S-ro Leborgne.
Gap : Esp. kursoj en la 2 teknikaj mezlernejoj : knaba Paul Héraud kaj knabina Sévigné.
Laon : En la knabina gimnazio 60 kursaninoj. Instruas S-ro Luez, profesoro pri lingvoj.
Laval : En la Teĥnika Lernejo, Esp. kurso por knabinoj.
Le Theil (Drôme) : Laŭ Heroldo (Februaro 61), ekde novembro 60, kurso al 25 geknaboj (14-17 jaraj) en la 2 mezlernejoj.
Luçon (Vendée) : En la 2 gimnazioj instruas F-ino Obalska.
Mazamet (Tarn) : Esp. kurso en la Teĥnika knabina Gimnazio.
Montélimar : Laŭ « La Praktiko » de Januaro 61 : En la gimnazio S-ro Llorens instruas al 25 gelernantoj.
Montpellier : En 2 knabinaj gimnazioj, kursoj al entute 60 lernantinoj Instruas S-ino Laurenti.
Nîmes : En la gimnazio Montaury : 15 kursaninoj.
Orange : En la knaba gimnazio instruas S-ro Llorens.
Paris : Gimnazio Turgot : en rondo Geografio-Unesko, instruas S-ro Gérard al 20 lernantoj.
Perpignan : En la knabinaj gimnazio, mezlernejo, teĥnika lernejo kursoj de S-ro Llech-Walter.
Royan : En la klasika gimnazio, 2 kursoj de S-ro Chassériaud.
St-Avold (Moselle) : En la gimnazio, instruas S-ro Manceau el Creuzwald.
St-Etienne : en Centre d'Apprentissage, instruas S-ro Dumas.
St-Jean-en-Royans (Drôme) : En la mezlernejo, 2 kursoj.
Strasbourg : Esp. kurso en lernejo St-Thomas.
Sancoins (Cher) : En la mezlernejo, 40 knabinoj en 2 kursoj. Instruas S-ro Blanc.
Thiers (P.-de-Dôme) : En la teĥnika gimnazio, 2 kursoj kun entute 60 knaboj. Instruas S-ro Dessapt.
Vichy (Allier) : En la knabina gimnazio, S-ro Pruvost instruas al 20 knabinoj.
Vire (Calvados) : En la gimnazio, 2 kursoj kun entute 12 gelernantoj. Instruas S-roj Legret kaj Saperas.

En la Centra Montaro :

Konforme al la vasta tutmonda kampanjo de U.E.A. por akcelo de Esperanto en la lernejojn, diversaj instruistoj el la 4 departementoj : Allier, Cher, Nièvre, Puy-de-Dôme, aktive agadas sur tiu kampo. Nun 5 duagradaj lernejoj havas Esperanto-kursojn, nome : Vichy (Allier) : en la knabina liceo kurso de S-ro Pruvost al 20 lernantinoj ; Bourges (Cher) : en la instruistina seminario kurso por la tuta unua klaso kun 21 lernantinoj ; Sancoins (Cher) : en la knabina mezlernejo (C.E.G.) 2 kursoj gvidataj de S-ro Blanc kun entute 40 knabinoj ; Casne-sur-Loire (Nièvre) : en la liceo kaj mezlernejo, 2 kursoj de S-ino Chaumereuil kun 40 gelernantoj. Thiers (P.-de-Dôme) : en la teĥnika liceo, S-ro Dessapt gvidas 2 kursojn por 60 lernantoj.

Instruistina Seminario en Bourges :

Elstaras la bonaj laboro kaj rezultoj en tiu eksterordinare favora medio. En la lernojaro 1960-61 la tuta unua klaso (21 knabinoj) lernis Esperanton sub la gvidado de F-ino F. Bonnot (3a klaso) - ekslernantino de F-ino S. Bontemps). Kontrolas la kursojn S-ino Direktorino F-ino Bertrand kaj S-ro Blanc (Sancoins). La 2a klaso (22 knabinoj), kiu lernis pasintjare kun F-ino Gateau, interkorespondas kun junuloj el eksterlando. Okazis dum la jaro diversaj kulturaj vesperoj, kiujn ĉeesti ne nur la 45 esperantistaj knabinoj de la seminario, sed ankaŭ diversaj profesoroj kaj gesamideanoj el Bourges kaj Vierzon : prezento de dulingvaj dokumentaroj Beneluksο (S-ro Blanc) Izraelo (S-ro Requillard, Vierzon). Tre valora kaj efika estis la vespero NovZlando gvidata de la samideana paro Wiltshire el Novzelando mem (lumbildoj kaj maoriaj kantoj).

Nun la tuta profesoraro apogas la esperantistan agadon : La agregacia profesoro pri angla lingvo jam eklernas Esperanton. Tio instigas nin al pluraj klopodoj en la aliaj seminarioj kaj lernejoj de nia federacia teritorio. Ekde septembro-oktobro 61, kun afabla konsento de la Direktoro S-ro Barbier, malfermiĝos Esp. kurso en la seminario de Nevers (geknaboj). Niaj geamikoj en Moulins provos malfermi kurson en unu- aŭ en la du seminarioj de departemento Allier. En Clermont la 2 liceestroj deklaris sin tute pretaj helpi al inaŭguro de Esp. kursoj por siaj gelernantoj.

En la federacia kongreso en Clermont (11-5-61) :

kiu vizitis pli ol 200 gesamideanoj (plejmulte gejunuloj), partoprenis 45 knabinoj de la seminario en Bourges akompanataj de S-ino Intendantino, kaj 40 knabinoj de la mezlernejo en Sancoins akompanataj de sia direktorino. 2 aŭtobusoj veturigis ilin de la reciprokaj lernejoj al la kongres-urbo. Partoprenis ankaŭ grava delegitaro el la teĥnika liceo en Thiers.

Esperanto-ekzamenoj en Cher-Nièvre :

Sancoins : 7-5-61. Supera Atesto : 4 knabinoj sukcese alfrontas ĝin. Ekzamenantoj : S-ro Chagnoux (Moulins), S-ro Blanc (Sancoins). 1 cito tre bone.

Bourges : 31-5-61. Atesto pri Lernado. En la seminario, la tuta unua klaso (21 knabinoj) brile sukcesas : 3 citoj bone, 16 tre bone, 2 bonege.

Ekzamenantaro : S-ro Chagnoux (Moulins), F-ino Dumarçay (Bourges), S-ro Gitton (Vierżon), S-ro Blanc (Sancoins).

Post la ekzameno, honorvino en la ĉeesto de S-inoj Direktorino kaj Intendantino, kaj de ĉiuj 45 esp. knabinoj. Alparoloj de S-roj Chagnoux kaj Blanc por admono al persistemo, plua laboro kaj eniro en la movadon. Post ricevo de la diplomoj, ilin solene transdonas la direktorino.

Cosne-s.-Loire (4-6-61) :

Atesto pri lernado : 7 gekandidatoj de S-ino Chaumereuil tre bone sukcesas (inter ili 1 kun cito bonege). Ekzamenantoj : S-ro Tourneruillert (Nevers), Blanc (Sancoins). Dum tiu ekzameno ĉeesto de la Akademia Inspektoro S-ro Daumas kaj de F-ino Robin, distrikta inspektorino, ambaŭ varmaj geamikoj de nia lingvo. S-ro Akademia Inspektoro anoncas la rezultojn, manpremas la laŭreatojn, admonas ilin al praktika uzo de la eklernita lingvo.

La diversaj taggazetoj de departementoj Cher kaj Nièvre tre bone raportis pri tiuj 3 ekzamenoj (artikoloj + fotoj), kio tre favore impresis la instruistaron. En departemento Cher ni konstatas fortan interesiĝon ne nur ĉe la unuagrada instruistaro sed ankaŭ ĉe la duagrada profesoraro. 2 profesoroj pri lingvoj ĵus petis la kurson Baronnet por eklerni la lingvon kun la intenco iam instrui ĝin al propraj lernantoj en la liceo (Bourges).

Rimarkoj :

Tiu tabelo certe ne estas kompleta. Tro multaj kursestroj — eĉ inter la plej viglaj — neglektas informi pri la faritaĵoj. Ĉiu kursgviidanto tamen devus konscii, ke ju pli kompleta kaj impona estos la listo de la francaj lernejoj kun Esp. kursoj, des pli efike ni impresos la lernejajn instancojn en niaj klopodoj por iompostioma enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Ankaŭ por kolegoj, kiuj hezitas ion entrepreni, posedo kaj elmontro de grava listo estos instigilo kaj utila helpilo. En nia nuna mondo, trafaj faktoj valoras pli ol la plej subtila rezonado. Ies sukceso helpas al alies sukceso. Krei kaj gvidi kurson estas gratulinda kaj promesplena laboro. Informi nin pri ĝi estas la nepre necesa komplemento al tiu laboro : tasko, kiu postulas nur 5-10 minutojn unu aŭ dufoje en la jaro.

Grava alvoko :

Kursestroj, ne forgesu informi nin indikante : en la komenco de ĉiu kurso la tipon de lernejo, la nomon kun adreso de la kursgvidanto, la nombron kaj aĝon de la gelernantoj, en la fino de la lerojaro la rezultojn.

Sendu la informojn al : Roger BLANC, Esperanto-delegito, SANCOINS (Cher).

Komisiita por statistiko de Lerneja Komisiono.

AL LA VENKO ! Tiuj faktoj kuraĝigu la geinstruistojn, kiuj ankoraŭ timas ion entrepreni. Ni instruu Esperanton ĉie kaj ĉiam, kie kaj kiam eblas. Ni konkeru la mezlernejojn, la liceojn kaj ĉefe la seminariojn. Kiam ni povos fieri pri tre ampleksa lernejaro kun Esp. kursoj, tiam ni certe ricevos oficialan agnoskon. Ni ne atendu la unuajn paŝojn de la neesperantistoj. Nur de ni mem dependas la fina venko !

R. B.

UNU TAGON EN ANGLUJO

Kiel delegito de la Nordfranca Federacio, S-ro J. Doyelle unuafoje ĉeestis esperantistan kunvenon en Dover. Jen kelkaj el liaj voĝaj-impresoj...

... Sur la ŝipo « Côte d'Azur », laŭtparolilo invitas ĉiujn nebritajn pasaĝerojn viziti la pasportejon. Jen mi estas kaj klarigas al la oficisto mian deziron partopreni esperantistan kongreson en Dover. La funkciulo deziras al mi sukceson kaj bonan restadon, sed li tamen miras, ke oni povas vojaĝi Anglujon pro tia celo !...

Post duonhoro, la ŝipo jam atingas la Folkestonan kajon. Terura kunpuŝiĝo inter sakoj kaj valizoj, jen angla sojlo, dogano, elirejo kaj min atendantaj tre afablaj samideaninoj...

Rendevuejo estas la pitoreska kaj antikva kastelo de Dover, lokita kiel agla nesto ĉe la klifa supro, fronte al la maro. Post klarigoj de la gvidanto, la laborkunsido de la S.O.E.F. (angla sud-orienta Esperanto-federacio) okazas ĉe la hejmo de S-ro Smith. La prezidanto de S.O.E.F., S-ro Fidler, bonvenigas la anglajn kaj eksterlandajn gastojn.

S-ro Smith klarigas sian planon pri tri-landaj renkontiĝoj inter mar-bordanoj el Britujo, Belgujo kaj Francujo. Miavice, mi alparolas nome de nia Nordfranca Federacio, kiu principe konsentas pri la projekto, studota kun belgaj geamikoj.

La ĉeestintoj aŭdas surbendigitan drameton de Pola Radio kaj la renkontiĝo finiĝas per la historio de la loka movado, kiu festas sian 45-an dat-revenon...

L'ESPÉRANTO dans la Presse Française

LE SOIR (quotidien, Marseille). — Nouvelles espérantistes (1-2).

OUEST-FRANCE (quotidien, Rennes, édition de Bayeux-Vire). — Grâce à l'Espéranto, M. Saperas, instituteur à Vire a retrouvé sa famille émigrée en Argentine (16-1).

LE BOCAGE NOMAND. — M. Saperas retrouve sa famille grâce à l'Espéranto (20-1).

PARIS-NORMANDIE (Rouen). — Présentation de l'Espéranto aux lycéens par M. Ribot (18-1).

Deux coupures de journaux (sans nom ni date), concernant les activités de « Rodana Stelo », l'actif groupe de Montélimar, avec clichés.

LA NOUVELLE REPUBLIQUE (quotidien, Tours). — Propagande espérantiste pour la Touraine (21-2).

L'AMI DU 19e (journal de quartier, Paris - sans date). — L'Espéranto, pourquoi pas ?

LE HAVRE (Le Havre). — Médecine et espéranto (15-2).

L'EXPRESS (mensuel, Paris), dans son numéro de février, mentionne la traduction en espéranto de « Le Petit Prince », d'Antoine de Saint-Exupéry.

OUEST-FRANCE (quotidien, Rennes). — Cours public d'Espéranto par M. R. Martin, agrégé de l'Université (22-2).

COURRIER DE L'OUEST (quotidien, Angers). — Cours d'espéranto à Grésillon. — Rencontre de jeunes espérantistes en Forêt Noire (1-2 et 17-2).

COMBAT (Paris). — Pour une langue mondiale (25-3).

L'ECHO D'ORAN (quotidien, Oran). — Un congrès pas comme les autres (5-10-60). — Présentation du « Cours pratique d'Espéranto » de Louis Fourcade, édité à Alger par « Les Editions Françaises » (26-2).

ORAN REPUBLICAIN (quotidien, Oran). — 17 pays proposent l'Espéranto pour le Prix Nobel de la Paix (4-3).

L'INDEPENDANT (quotidien, Perpignan). — La « Voix de l'Amérique » répond aux questions posées par le Centre Culturel Espérantiste (24-3).

LE SOIR (quotidien, Marseille). — Nouvelles espérantistes (29-2).

L'IMPARTIAL (Les Andelys). — 17 pays proposent l'Espéranto pour le Prix Nobel de la Paix (16-3).

DERNIERE HEURE LYONNAISE. — 17 pays proposent l'Espéranto pour le Prix Nobel de la Paix (3-3).

SUD-OUEST (quotidien, Bordeaux, édition de Royan). — Le stand des espérantistes à la Foire-Exposition de Royan (31-3).

COURRIER DE L'OUEST (Angers). — Au Château de Grésillon (1-3). — Avec l'Espéranto sur les routes du monde (10-3). — La Voix de l'Amérique (15-3). — Au Cercle Espéranto (29-3).

EXAMENS ET CONCOURS (mensuel, Alger), publie le cours d'Espéranto de M. Louis Fourcade, qui vient d'être édité à Alger.

LES NOUVELLES (Les Andelys). — 17 pays proposent l'Espéranto pour le Prix Nobel de la Paix (5-4).

L'IMPARTIAL (Les Andelys). — Un congrès pas comme les autres (Congrès de Normandie) (15-4). — XXXe Congrès normand d'Espéranto (28-4).

L'INDEPENDANT (quotidien, Perpignan). — La conférence de Delfi Dalmaù en Espéranto (19-4).

LES NOUVELLES (Les Andelys). — Un ministre danois fait un appel à la radio en faveur de l'Espéranto (19-4)..

LA MARSEILLAISE (quotidien, Marseille). — Apprenons l'Espéranto (3-4).

LE GROUPE D'ALES (Gard) « La Verda Stelo » envoie régulirement des informations espérantistes aux journaux régionaux. Dix-neuf articles sont parus au cours des derniers mois dans les journaux suivants : « Le Provenal » (Marseille) ; « Le Midi Libre » (Montpellier) ; « La Marseillaise » (Marseille) ; « Le Méridional » (Montpellier). Parmi ces articles, deux parus dans le « Provençal » — à propos du Centenaire de la naissance de Zamenhof et Le Billet de Melchior — n'ont pas été communiqués, mais sont l'œuvre du rédacteur local du journal. Nos félicitations à « La Verda Stelo » pour son efficace propagande.

LA MODE CHIC, journal de luxe féminin, dans son numéro de février, soulignait combien la multiplicité des langues est nuisibles au développement de l'entente internationale. M. Eyssautier, de Lyon, a répondu à cet article par une lettre documentée et éloquente, que la « Mode Chic » a publiée dans son numéro de mai sous le titre : « Vive l'Espéranto ».

LE MAINE LIBRE, quotidien du Mans, dans son numéro du 6 avril, consacre un article illustré à la réalisation en cours d'un groupe de 152 maisons individuelles avec jardin et garage. Ce groupe est traversé par une grande avenue de 20 m. de large, qui s'appellera « Avenue du Docteur-Zamenhof ». Nos félicitations aux espérantistes du Mans et notamment à M. Michel, président du Groupe Renault, pour ce succès.

L'ECOLE LIBEREE, bulletin mensuel des instituteurs du Rhône, publie chaque mois, une importante chronique espérantiste, signée de Mlle G. Perra. Initiative à encourager et à imiter.

LE MONDE DES PHILATELISTES, connu non seulement en France, mais à l'étranger, où il compte de nombreux abonnés, publie chaque mois, une très intéressante chronique en langue internationale, sous le titre « Espéranto », signée de M. Jack A. Rousseau.

A signaler, dans le no d'avril, un article documenté sur : « Le nouvel Etat Scandinave de Morokulien » signé : Jack A. Rousseau, fakdelegito de U.E.A. et donnant comme références bibliographiques « Norda Prismo » et un bulletin philatélique anglais.

LA INFORMILO, trimonata organo de la « Orienta Federacio de U.E.F. » kaj de la « Franca Junularo Esperantista » (sekcio de T.E.J.O.) publikigas tre interesajn artikolojn pri nia movado kaj pri la junulara movado. Adreso : Maison des Jeunes, Section Espéranto, 27, rue de la République, Nancy.

LE VOYAGE DE M. HAMVAI à travers la France a remporté un succès remarquable. Il fut d'une grande portée pour la propagande de l'Espéranto. Tous les journaux régionaux ont longuement parlé de la conférence de notre samideano, avec éloges, parfois avec enthousiasme. Tous ont illustré leurs articles de photos, ainsi qu'en témoignent les coupures en ma possession extraites des journaux suivants :

« Le Midi Libre » (édition de Perpignan), « Nord-Matin » (édition de Lille et de Tourcoing), « Liberté » (région du Nord), « La Voix du Nord », « Le Progrès de Lyon », « L'Est Républicain » (édition de Pontarlier) ; une coupure sans nom de journal, relatant la visite de M. Hamvai à Epernay ; une autre coupure également sans indication d'origine, a pour titre : « Le docteur J. Hamvai a été reçu à la maison Moë et Chandon » ; « L'Indépendant » (Perpignan).

L'ECLAIR, quotidien de Nantes, répandu dans toute la région, publie régulièrement une chronique espérantiste très intéressante, sous la signature de M. Pierre Castelli. Excellente propagande.

Une personnalité chinoise

interviewée en espéranto par la « Voix de l'Amérique »



En sia Esperanto-programo de la 24-a de Marto 1961 la Voĉo de Ameriko disaŭdigis intervjuon kun D-ro J.B. Se-Tien Kao, OFM, Ĝenerala Vikario de Fengsiang kaj Profesoro en la Fu-Jen-Universitato en Taipei (Insulo Taiwan, Ĉinujo). Pastro Kao multe vojaĝis en Azio, Eŭropo, Norda, Centra kaj Suda Ameriko kaj aktive partoprenis kaj helpis la Esperanto-movadon en diversaj landoj. Dum la pasintaj ses jaroj li loĝis en Rio de Janeiro. Li ĉeestis kelkajn Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj naciajn Esperanto-kongresojn en pluraj landoj. Nia bildo montras lin en konversacio kun regulaj kunlaborantoj de la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko antaŭ unu el la programoj. Sidas (de maldekstre) : John Petraitis, parolisto ; S-ino Eve-Marie Cuthbert, programsekretariino en la Usona Ministerio de Sano, Eduko kaj Bonfarto, parolistino ; D-ro William Solzbacher, estro de la Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko kaj membro de la Akademio de Esperanto ; Pastro D-ro Kao ; F-ino Clare Soponis, sekretariino de Kongresano Pucinski, Membro de la Usona Domo de Reprezentantoj, parolistino ; James Parisi, sonbendredaktoro. Staras inter D-ro Kao kaj F-ino Soponis : Vincent Gugliotta, reĝisoro. En la Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko partoprenis ne nur usonaj eminentuloj, sed ankaŭ gastoj el diversaj landoj : Kanado, Gvatemalo, Brazilo, Ĉinujo, Japanujo, Libano, Belgujo, Britujo kaj Francujo.

Internacia Korespondservo IKS ebligas korespondon al neesperantistoj

Amikiĝo inter homoj de diversaj nacioj estas dezirinda celo, tamen neatingebla por la plej multaj homoj, ĉar ili ne scias alian lingvon. Al tiuj homoj volas helpi la IKS-servo.

IKS-Landa-Ofico akceptas leterojn de ĉiu en sia nacia lingvo, tradukas ilin Esperanten kaj sendas ilin al fremda lando, kie la tiea Landa-Ofico plutradukas en la nacian lingvon de la ricevonto. Tiu pagas nenion. Nur la forsendanto pagas malgrandan sumon, por ke ankaŭ junuloj kaj malriĉuloj povu interŝanĝi leterojn.

La IKS-Centra-Ofico en Crailsheim organizis reton de Landaj-Oficoj kun perantoj (kiuj tradukas kaj peras adresojn) en multaj landoj, ĝis nun en Alĝerio, Aŭstrio, Egiptio, Finnlando, Francio, Hindio, Izraelo, Italio, Japanio, Suda-Koreo, Svedio, Svislando, Usono kaj Germanio. Ni serĉas kunlaborantojn en ĉiu lando, ankaŭ en la supre por ĉiu tradukenda letero servanta kaj al privata, amikeca korespondado kaj al komerca uzo.

Tiel IKS estas samtempe idealista kaj praktika afero. IKS utiligas Esperanton por ne-esperantistoj, ĉar multaj personoj pro iaj kaŭzoj ne povas lerni Esperanton, sed tamen volas kontakti kun eksterlandanoj kial ne helpi al ili per Esperanto ? Certe ni varbos multajn el ili por nia lingvo per nia IKS-servo.

Ni petas vin, la esperantistojn, kunlabori. Bonvolu skribi por detaloj al IKS-Centra-Ofico, Crailsheim-Germanio, poŝtkesto 39.

SERVICE DE LIBRAIRIE (Extraits)

ETUDE ET ENSEIGNEMENT

L'Espéranto cet inconnu (Ribot)	1,25
Valeur pédagogique de l'Espéranto	0,60
Programme des examens	0,45
ABC de Waringhien	1,50
Espéranto-Manuel (Chavet-Warnier) avec corrigés	5,00
Manuel d'Etude (Couteaux) avec corrigés	4,50
Manuel d'Initiation (Thailiet)	1,50
Ni parolu en Esperanto (Ribot) avec corrigés	4,70
L'Espéranto en douze leçons (Pierre Delaire)	13,00
Ludoviko en Nederlando (P. Delaire)	11,00
Espéranto fil d'Ariane (P. Delaire)	12,50
Plena Gramatiko (vol. I)	12,00
Privilegia Vojo al Lingvoscio (Setälä)	6,00
Unua Legolibro (Kabe)	2,00
Universala Legolibro (Fricke)	2,00
Dialekto, dialektiko (Dalmaù)	3,50

DICTIONNAIRES, LEXIQUES ET VOCABULAIRES

Dictionnaire Français-Espéranto (Léger & Albault)	20,50
Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Waringhien)	28,30
Lexique Espéranto-Français (Léger)	5,40
Naŭlingva Etimologia Leksikono (Bastien)	10,00
Plena Vortaro de Esperanto	15,00
Scienca kaj teknika terminaro	20,00
Vocabulaire de poche (Bastien)	2,40

LA MOVADO (Lingvo, Historio)

Le Docteur Espéranto (M. Ziolkowska) broché	6,50
« « Relié	13,50
La Esperanto Movado (Stöp-Bowitz kaj Isbrucker)	3,00
La Internacia Lingvo (Lapenna), bindita	8,50
Retoriko (Lapenna), bindita	16,50
Leteroj de L.L. Zamenhof (Waringhien) I kaj II binditaj, kune	20,00
Originala Verkaro de Zamenhof, bindita	18,00
Vivo de Zamenhof (Privat)	4,50
Historio de la Lingvo Esperanto (Privat)	8,50

LITERATURO (Prozaĵoj)

Les Héros Existentialistes dans l'œuvre de J.-P. Sartre (Colette Llech-Walter) texte bilingue	2,00
Angla Antologio (Auld kaj Rossetti)	14,00
La Aventuroj de Marteno Drake (G. Norway), bindita	4,50
La Aventuroj de S-ro Longkrurulo (Uitterdijk)	2,00
Barbro kaj Eriko (Schneider kaj Carlsson)	1,00
Brulanta Sekreto (Stefan Zweig)	3,30
Colomba (Mérimée)	1,70
Topaze (M. Pagnol)	10,00
Reĝo Edipo. Antigona (Sofoklo)	10,00
Lingvo kaj Vivo (Waringhien), bindita	20,00
Fabiola (Kardinalo Wiseman) 7,50 ; bindita	12,00
La Forto de l'Vero (Adi)	3,50
La Goja Podio (R. Schwartz)	4,50
La Hundo Kruso (Ballantyne)	2,50
Infanoj en Torento (St. Engholm) I kaj II kune	5,60
Invito al Ĉielo (J.D. Sayers) broŝurita	4,50
Karlo (Privat)	1,20
La Karnavalo kaj la Somnambulino (Immermann)	3,30
Malsata ŝtono (R. Tagore), bindita	15,00
Akbar (Brouwer)	5,50
Kiso de la Reĝino (Naĵivin)	3,30
Kredu min Sinjorino ! (Rossetti), bindita	8,50
Miru, Pensu, Ridu (Bennemann), bindita	9,00
La Normandaj Rakontoj (Maupassant), bindita	17,00
Novaj Esperanto-Historietoj (div. aŭtoroj)	3,50
Princino de Marso (Burroughs)	1,70
Sep Vangofrapoj (Aszlanyi)	3,30
Taglibro de Anne Franck, bindita	11,50
La Tempo-Maŝino (H.G. Wells)	1,70
La Virineto en Bluo (Mason Stuttard)	3,30
Eroj (M. Boulton)	12,50
Esperanta Antologio. Poemoj, bindita 21,50, broŝ.	18,50
Fabloj de La Fontaine	2,00
La Floroj de l'Malbono (Beaudelaire)	13,50
Georgo Dandin (Molière)	3,00
Jozefo (Applebaum)	5,60
Kontralte (M. Boulton)	10,00
La Mokindaj Preciozulinoj (Molière)	1,20
Peer Gynt (Ibsen), bindita	11,20
La Revizoro (Gogol)	4,50
Sonĝe sub Pomarbo (Baghy)	10,00
La Stranga Butiko (Schwartz)	3,00
Dana Antologio, bindita	16,50

RELIGIO KAJ FILOZOFIO

Maksimoj de La Rochefoucauld, franca kaj Esperanta kune (Waringhien)	2,00
La Nova Testamento, bindita	3,00
Sankta Biblio, bindita	10,00
La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo (Dickens), bindita	5,00

GEOGRAFIO — VOJAĜADO

Nepalo malfermas la pordon (T. Sekelj)	15,00
Aŭstralio — Lando kaj Popolo	3,50
Ekspedicio Kon-Tiki (Heyerdahl), bindita	18,50
Kanako el Kananam (K.-G. Linton)	11,00
Tempesto super Akonkagvo (T. Sekelj)	11,00
Pariza Gvidlibro Ilustrita	2,50
De Parizo al Lazura Marbordo (Rétot)	1,60

ARTO, KOMERCO, SCIENCO KAJ TEKNIKO

Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj (Neergaard)	15,50
La Vivo de la Plantoj (Neegaard)	11,50
Sekretoj de la Marestaĵoj	7,50

GRAMOFONDISKOJ

Disque de prononciation	4,00
Parolado de Lapenna	8,50
Melodioj (La Espero, Ĉeriz'Tempo, Fontano klara)	12,00
Diversaj Melodioj (kvarvoĉe) I, II, III, ĉiu	10,00
Livres illustrés pour les jeunes (Série)	10,00

Frais d'expédition et de poste :

20 % jusqu'à 10 NF ; 15 % jusqu'à 20 NF ; et 10 % au-dessus.

Toutes les commandes sont à adresser, avec les fonds, à : Union Espérantiste Française, 34, rue de Chabrol, Paris X[e]. C.C.P. 855-35 Paris.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie COCONNIER

Le Gérant : J. GUILLAUME.